# starto

ELDONAS ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO




1982 · 2 · (90)

KOVOVÉ
METALAJ REMIZOJ
GARÁŽE

el ŝtala lado - fundamenta farbotavolo - duparta pordego - deklina tegmento - sen planko - facila muntado aŭ sur submuro aŭ sur ebena tereno

Longo 4400 mm - prezo 4840,-Kčs
Longo 5300 mm - prezo 5350,-Kčs
Longo 6200 mm - prezo 5830,-Kčs
Larĝo 3030 mm alto 2450 mm estas egalaj ĉe ĉiuj tri tipoj.

Je mendo fabrikas kaj dum malonga tempo 1-2 semajnoj liveras

INKLEMO
PRAHA (kooperativo)

Skribajn mendojn sendu al la adreso de komerca fako: INKLEMO PRAHA, maloobchodní úsek, 190 00 PRAHA 9, Spojovací 11, aŭ telefonu al n-ro 83 09 49. Persone mendeblaj en Pragaj vendejoj de la kooperativo. Transporton ni povas certigi. Remizojn ni liveras nur al privatuloj.


# TIO ESTIS JA GLORA KONGRESO...

Kvankam en la tempo, kiam vi legos tiujn ĉi liniojn, dividos nin jam pluraj semajnoj de la IVa kongreso de nia Asocio, la rememoroj pri la brila evento certe ne malfortiĝis.

La kongreso sendube estis gravsignifa mejloŝtono en la evoluo de nia movado. Ni ne substrekas sole belan kaj sinceran atmosferon, intereson de oficialaj instancoj, la vicon de neoftaj signifaj eksterlandaj kaj enlandaj gastoj, aŭ nekutiman nombron de kelkcent niaj membroj, kiuj faktoj estis certe tre agrablaj kaj interesaj..., nek la perfektan preparon, organizon kaj senmankan kongresfluon, sub kiuj kaŝas sin multega laboro de sennombraj volontuloj..., sed ni pensas pri kritika pretendemo dum la pritaksado de la ĝisnuna laboro de nia tuta Asocio, pri la analizo de la stato de nia movado kaj pri la finkonkludoj, fontantaj el tiu ĉi stato. Tio respeguliĝis ne sole en ĉefaj raportoj, sed ankaŭ en la diskutkontribuaĵoj de dekoj da personoj. Same la intereson dokumentas la nombro da delegitoj. Per lokaj grupoj 97,5 % elektitaj delegitoj la traktadojn partoprenis.

En kelkaj nelongaj rememoroj ni promenu tra ĉiuj kongrestagoj, rememorigu tiujn momentojn, kiujn vi eble jam forgesis aŭ ne partoprenis...

<u>Vendrede la 19an de marto</u>
alveturas delegitoj kaj kelkaj eksterlandaj gastoj. La ceteraj estas jam surloke kaj partoprenas inter 13a-14a h. la akcepton ĉe la urbestro de Pardubice, urbo kun centmil da loĝantoj. Kun eksterlandaj gastoj formas la delegitaron ankaŭ la membroj de asocia prezidantaro kaj la reprezentanto de kulturministerio de Ĉeĥa soc.respubliko. La urbestro salutis la kongreson, parolis pri la evoluo de la urbo kaj esprimis sinceran ĝojon, ke la urbo povis bonvenigi tiun ĉi signifan traktadplenan parlamenton de la Asocio.

Inter 16a-18a h.realiĝis kunesto kun centraj politikaj kaj administraj organoj. En interesa diskuto estis responditaj multaj aktualaj demandoj.

Precize je la 19,30a h. startis solena vespermanĝo por invititaj gastoj en tiucela salono de la kongresa domo. Altabliĝis honoraj membroj de la Asocio, eksterlandaj gastoj, estroj de pluraj kulturinstitucioj, en kies kadro funkcias niaj lokaj grupoj, reprezentantoj de neesperantistaj organizaĵoj, kun kiuj la Asocio kunlaboras, membroj de asocia prezidantaro kaj sekretariejo. Post solenaj salutvortoj kaj tostoj /oni ne forgesis eĉ ĉeestantajn Jozefojn/ disfluiĝis agrabla amuzvespero... Reston de la vespero travivis la partoprenintoj de solena vespermanĝo kun la ceteraj en kultura programo de literatura-arta sekcio. Vespero bonege sukcesis ankaŭ pro la kontribuo de gitargrupo "Barbuloj", kiu tiel sin prezentis en granda kaj certe sukcesa premiero.


<u>Sabate la 20an de marto</u>
oni daŭrigis precize laŭ la preparita plano. Je la 9,15a h. per enkondukaj vortoj malfermis la kongreson asocia sekretario Zd.

Křimský. Elektitaj estis kongresaj komisionoj kaj labora prezidantaro. La prezidanto prezentas sian raporton pri agado kaj stato de la Asocio kaj la sekretario kompletigas la raporton pri mastrumado kaj entuta ekonomia situacio. Oni aŭdas la vortojn: "Plua laboro de la Asocio estontece direktiĝos ĉefe al plibonigo de agado en lokaj grupoj" ... kaj "al gajno de novaj fontoj de enspezoj kaj malaltigo de propraj elspezoj ... alie oni devus altigi membrokotizojn, kiuj sukcese jam pli ol 6 jarojn havas saman nivelon".


La raporton de revizia komisiono prezentas d-ro Rusín, prezidanto de CKRK. Li substrekas bazan asocian taktikon, kiu sinsekve gvidas al surtabligo kaj estigo de bezonaj juraj bazaj principoj en mastrumado de la sekretariejo, sed ankaŭ de lokaj grupoj, de arkivado de materialoj, de plenumado de decidoj de pli altaj asociaj organoj. Al tiu ĉi celo direktas ankaŭ bezonaj ŝanĝoj en la asocia Statuto.

Antaŭ la tagmeza paŭzo prezentis sian paroladon la reprezentanto de kulturministerio de ČSR k-dino Libuše Vaňková. Ŝi pritraktis la kulturpolitikon de la ŝtato kaj la lokon, kiun en ĝi okupas nia Asocio. Ŝi diris i.a.:..."Surbaze de regulaj pritaksadoj dum lastaj jaroj mi povas respondece diri, ke ĈEA aktive ligiĝas al realigado de kulturpolitika linio de nia ŝtato ...".Ŝi pritraktis ankaŭ la bezonon de bona kunlaboro kun establaj institucioj kaj aldonas:..."La supozo de bonaj kontaktoj de establaj institucioj kaj esper.kolektivo estas ambaŭflanka intereso, disciplino, kompleza pripenso de bezonoj de partnero, helpo kiam montriĝas la bezono"... Ŝi menciis ankaŭ nian membrecon en UEA. La partopreno de niaj organizoj kiel de kolektivaj membroj en eksterlandaj organizaĵoj estas ĉiam pli kaj pli severe prijuĝata ĉefe el la vidpunkto kion tiu ĉi membreco povas doni al nia ŝtato. Ĝis nun nia membreco de UEA estis ĉiam aprobita kaj nur de ni dependas ĉu tiel estos ankaŭ estontece. Kompreneble tion ankaŭ kondiĉigas niaj kontaktoj kun eksterlando, agado de niaj esperantistoj fremdlande, kie ili ĉesas reprezenti nur sin mem, sed certagrade reprezentas ankaŭ tutan nian popolon. Fine ŝi diris:..."Mi volas konstati, ke ĈEA estas taksita kiel unu el la plej aktivaj interesorganizoj. Ni subtenos vian Asocion ankaŭ estontece ne nur morale, sed laŭ niaj eblecoj ankaŭ finance"...







Posttagmezo estis daŭrigita per salutvortoj de eksterlandaj gastoj. Krom la reprezentantoj de ĉiuj socialismaj landoj /por la unua fojo ankaŭ de Rumanujo/ salutis la kongreson reprezentanto de Esperanto-Asocio de Finnlando Heta Kesälä kaj la prezidanto de IFEF Joachim Giesnner.

Post koncerna diskuto la kongreso aprobis ŝanĝojn en la Statuto kaj elektis per absoluta plimulto da voĉoj novan Centran komitaton kaj CKRKn. En nepublika kunveno, kiu tuj sekvis, estis elektita asocia prezidanto, 2 vicprezidantoj, sekretario kaj 3 membroj de la prezidantaro.

Kaj vespere atendis la partoprenantojn agrabla surprizo. El České Budějovice alveturis 17membra blovinstrumenta orkestro kun sia muzikestro Kubata /kiu pretas muziki por niaj lokaj grupoj, por eksterlandaj esp.asocioj, sed ankaŭ por neesperantistoj/. La enkonduko estis preparita en Esperanto kun nova teksto de mondkonata polko "Škoda lásky - Rosamunda" de jubileulo J.Vejvoda. Cetere...kiel la kongresa balo plaĉis ankaŭ al eksterlandaj gastoj tion dokumentas la bildoj en kongresa katalogo mendebla en la sekretariejo, same kiel la fotoj en tiu ĉi numero de Starto, sed ankaŭ la fakto ke persistemaj dancemuloj forlasis la salonon...post la 2a h. matene.

<u>Dimanĉe la 21an de marto</u>
je la 9a h. komencas la lasta kongrestago. Prezentiĝas nova asocia prezidantaro, Eli Urbanová, d-ro Josef Hradil kaj Karel Franc estiĝas honoraj membroj de la Asocio, vico da honoraj distingoj kaj diplomoj estis disdonita. Dum la ferma diskuto estis akceptita kongresa rezolucio kontraŭ la vetarmado kaj aprobitaj ceteraj kongresaj dokumentoj. En sia ferma alparolo antaŭ la 12a h. adiaŭis la ĉeestantojn prezidanto de la Asocio d-ro Jaromír Jermář CSc. La solenajn momentojn finis akordoj de la Himno de esperantistoj.

Por la kongreso s-ano J. Klement preparis sukcesan modernstilan ekspozicion. En la vendejo de libroj kaj esperantaĵoj bonege provizita, disvendiĝis materialoj por 17 000 Kčs. Fotodokumentado kaj surbendigo de tuta kongreso estos valoraj rememoraĵoj. Bonega estis kaj la manĝo kaj loĝigo en transstrata proksimeco kaj ni ripetu nur la komencajn vortojn: Tio estis ja glora kongreso...

Ni esperu kune kun vi, ke ne restas sole agrablaj rememoroj, sed ke pluraj novaj kunlaborantoj kun bona volo enviciĝos en nian komunan agadsferon. Tio validas ĉefe por nia juna genera-

cio, kiu anstataŭ junulara komisiono havas nun propran sekcion kun propre elektita sia estraro. Volontuloj, pretaj helpi, anoncu sin al la Estas nur dezirinde, ke post kvin jaroj, kiam ni ĉenove travivos la kongresan atmosferon, estu nia agado same alte kaj pozitive taksata kaj ke ni povu ĝin prepari kaj travivi en trankvilo kaj paco.











## ALPAROLO DE ASOCIA PREZIDANTO ANTAŬ LA KONGRESA FERMO

Estimataj delegitoj, estimataj gastoj,

permesu al mi, ke mi ĉe la fino de nia kongreso, dum kiu estis elektitaj niaj plej altaj agadorganoj, esprimu mian konkludon, kiu fontas el tuta dumkongresa traktado, ke nia Asocio daŭrigos la laboron, kiun ĝi fiksis en siaj programoj kaj planoj responde al nia reala situacio.

Alte mi taksas la fakton, ke ni povas en kongresaj konkludoj taksi realon, ke Esperanto kaj esperantistoj ekzistas kaj laboras en kondiĉoj de moderna socialisma socio kaj ke ĝuste en tiu ĉi socio ili serĉas celon kaj sencon de sia agado.

Mi kredas, ke ni ĵus vivas en tia epoko, sen prikonsidero de internacia situacio, kiu preskaŭ determinas por realigo ideojn de internacia planlingvo. Gravas, ke por tiu ĉi situacio ni estu preparitaj, ke nia agado kaj same la pensado respondecu al deziroj de nuntempo ĉiurilate.

Ni faris multon kaj ni kredas, ke ni povos dokumenti historian bezonon de nia ekzisto ankoraŭ pli forte. Ĉe la fino de nia kongreso, kiu laŭ mia opinio havis tre altan nivelon, mi volus esprimi miajn dankojn al ĉiuj delegitoj, ĝisnunaj funkciuloj de ĉiuj asociaj gvidŝtupoj, al ĉiuj gastoj enlandaj kaj eksterlandaj kaj ĉefe al organizantoj de tiu ĉi kongreso tiom nervostreĉa kaj temporaba, t.e. al esperantistoj en Pardubice frunte kun s-ano Karel Franc.

Por ontajlaboro kaj agado mi deziras al vi bonan volon kaj sukcesojn. Transdonu niajn salutojn al ĉiuj membroj de viaj bazaj organizoj.

## REZOLUCIO DE IVa KONGRESO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO

Delegitoj de la Kongreso de ĈEA dum la tagoj 19a-21a de marto 1982 pritaksis entutan agadon de la Asocio rilate al la taskoj, kiuj por la Asocio fontas el konkludoj de XVIa kongreso de KPĈ. Pripensante komplikan internacian situacion kaj tutmondan aktivadon por konservi la pacon, ili malaprobas nuntempan politikon de usona prezidento Reagan kaj intencon gvidi la homaron al rando de nuklea mondmilito.

Ili substrekas, ke ĉeĥaj esperantistoj ankaŭ nuntempe apartenas al progreseme pensantaj tavoloj de nia loĝantaro kiel ankaŭ estis en tuta antaŭa historio. Ili direktos sian agadon por bono de nia socialisma ŝtato akorde la politiko de Nacia fronto kaj por forigo de streĉiĝo en la mondo.

Fine de siaj traktadoj la Kongreso akceptas tiun ĉi rezolucion:

a p r o b a s

1. la raporton pri agado de Centra komitato en pasinta funkcia tempperiodo kaj la raporton de Centra kontrola kaj revizia komisiono.

2. la agadon de Centra komitato de la Asocio, de ĝia prezidantaro, sekretariejo kaj de CKRK ekde lasta kongreso kaj esprimas la konsenton kun akceptitaj devligoj kaj decidoj kaj mastrumado de la Asocio kaj esprimas absolutorion al detiriĝanta asocia centra komitato,
3. proponitajn ŝanĝojn en la Statuto de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,

d e v i g a s

1. la Centran komitaton divide ellabori konkludojn kaj temojn de antaŭmetitaj raportoj el diskutoj por aŭtuna plenkunsido de CK ĈEA en konkretan laborplanon de la Asocio rilate al konkludoj de XVIa kongreso de KPĈ,
2. lokajn grupojn prilabori konkretajn agadplanojn laŭ lokaj cirkonstancoj por venonta kvinjara periodo kaj transdoni ilin al la sekretariejo ĝis fino de julio 1982,
3. asocian Centran komitaton profundigi la kunlaboron kun AE en SSR kaj kun ceteraj esper. organizaĵoj, speciale kun tiuj de socialismaj ŝtatoj,
4. asocian Centran komitaton kaj sekretariejon profundigi direktadon kaj kunlaboron kun gvidorganoj de sekcioj kaj komisionoj, kun komitatoj de konfiduloj kaj lokaj grupoj, laŭ la principo de demokratia centralismo gvidi la membraron de ĈEA kaj realigi ĝian konscian membrecon,

d a n k a s

al retiriĝantaj membroj de CK ĈEA kaj CKRK kaj gvidantoj de komisionoj kaj sekcioj por la ĝisnuna prospera kaj sukcesa agado por bono de la Asocio kaj laŭ la iniciato de politik-idea komisiono kaj asocia sekretariejo transpruntas honorajn membrecojn kaj honorajn rekonojn pro la konstruado de la Asocio, helpo en ĝia gvidado kaj efika kunlaboro,

d e v l i g a s

funkciulojn de la Asocio, de lokaj grupoj kaj ĉiujn membrojn subteni akceptitajn konkludojn de IVa kongreso de ĈEA, tiamaniere labori por interkompreniĝo de popoloj en la senco de politiko de nia ŝtato kaj Fina akto de Helsinki, por firmigo de paco kaj kunlaboro inter popoloj kun malsamaj politikaj sistemoj.

# La internacia jaro de komunikado *

La artikolo de la prezidanto de UEA s-ano G. Maertens en Starto 1/82 igas nin pripensi la programon de niaj preparoj por la jaro 1983, la Internacia jaro de komunikado.

S-ano Maertens prave atakas la suspektemon de la unuopaj organizaĵoj, kiam neniu volas, eĉ ŝajne, subiĝi al la alia. Sukceso en nia strebado antaŭvidas kaj postulas unuecan kunlaboron. Unuecon en diverseco kaj en toleremo.

La Universala Esperanto-Asocio estas neŭtrala, inkluzivas aliajn specialajn organizaĵojn: MEM, SAT, ISAE, IKUE, KELI, IFEF, ILEI kaj aliajn. Tiuj organizaĵoj, laŭ sia karaktero, estas specialaj, sed ĉiuj celas, siavoje, la pacon kaj interkompreniĝon.

En nia komuna intereso devas esti, ke ĉiuj tiuj organizaĵoj agnosku la Universalan Esperanto-Asocion kiel ŝirm- aŭ tegmentorganizaĵo, kiu reprezentas Esperanton eksteren, ankaŭ en la organoj de la Unuiĝintaj Nacioj. La specialaj asocioj sentiĝu aliĝintaj al UEA. Nur tiel Esperanto povas prezenti sin digne kaj konvinke.

Kompreneble, realigo de ĉi tio ne estas simpla.

En la Internacia jaro de komunikado temas precipe pri informado. Ĉi-okaze, ĝi devas efektiviĝi tri-direkte: esperantlingve horizontale kaj vertikale /t.e. al la internaciaj fakaj organizaĵoj kaj al la enlandaj asocioj/ kaj nacilingve al la samfakaj neesperantistaj partneroj.

Tio estas baza formo. Ŝajnas, ke por plenumi ĝin, mankas al ni kaj personaj kaj materiaj rimedoj. Ni devas trovi alian formon de informado. Ni devas informi niajn neesperantistajn partnerojn ne nur pri niaj enlandaj aferoj. Tio ne estus sufiĉe riĉa kaj konvinka por ili.

La monatalo Budapeŝta informilo fariĝis en la lastaj jaroj la plej grava informilo precipe por la sekvaj agadkampoj: junulara, scienca, fervojista, instruista k.a. BI laboras vere sisteme. El ĝi ni havus multe da informoj el aliaj landoj, precipe el la socialismaj. Tio povus pli interesi niajn neesperantistajn partnerojn.

La unuopaj komisionoj aŭ sekcioj pritraktu precipe:

a/ la regulan informadon de BI,
b/ starigi, kiu prizorgos regulan kaj rapidan tradukadon de la koncerna rubriko de BI,
c/ starigi, al kiuj lokoj estu sendataj la informoj nacilingvaj.

Kompreneble, tio ne estas unusola vojo kaj maniero. Sed ni devas agi rapide, prepari la strukturon kaj jam en la nuna jaro plene kaj regule ekfunkciigi ĝin.

Se tio sukcesos, ne restos nur revo la ideo, ke "Le courrier de l' UNESCO" aperadu /almenaŭ en 1983/ ankaŭ en Esperanto.

-jl-

# Internacia literatura konkurso

La Patronaro de la "Fundación Esperanto" decidis organizi Internacian Literaturan Konkurson en Esperanto.

Estos du premioj kaj du subpremioj, por du malsamaj temoj, kvazaŭ ili estus du apartaj konkursoj.

PREMIO "SANCHO REBULLIDA"

Premio 12 000 pesetoj kun konfirma diplomo,
subpremio 6 000 pesetoj kun konfirma diplomo.

Oni aljuĝos la premiojn al la du plej bonaj verkoj libervole elektitaj en la temoj "Popola rakonto" aŭ "Priskribo pri urbo aŭ regiono kun la monumentoj kaj tradiciaj festoj kaj moroj".

PREMIO "JUAN MIGUEL PIQUERO"
Premio 10 000 pesetoj kun konfirma diplomo,
subpremio 5 000 pesetoj kun konfirma diplomo.

Oni aljuĝos la premiojn al la du plej bonaj infanaj rakontoj originalaj aŭ tradukitaj, verkitaj en facila lingvo, por ekinstrui Esperanton al infanoj havantaj la aĝon de sep ĝis dek jaroj. La rakontoj povas esti ilustritaj aŭ nur literaturaj. Pro ĝia ebla eldonado la ilustraĵoj devos esti originalaj.

R E G U L A R O

1/ Ĉiu konkursaĵo por premio "Sancho-Rebullida" ampleksu 4 - 6 foliojn.
Ĉiu konkursaĵo por premio "Juan Miguel Piquero" ampleksu 2 - 3 foliojn.

2/ Ĉiu konkursanto sendu kvin ekzemplerojn de la konkursaĵo tajpitajn laŭ duoblaj interlinioj, kun la indiko: "Por la konkurso de "Fundation ESPERANTO", premio.........."

3/ La konkursaĵoj estu subskribitaj per pseŭdonimo por kaŝi la identecon de la konkursanto, kaj en aparta fermita koverto, surhavanta la identigan pseŭdonimon, estu slipo kun la nomo kaj adreso de la konkursanto.

4/ Kiam publikiĝos la verdikto, publikiĝos samtempe la nomoj de la juĝintoj.

5/ La dat-limo /laŭ la poŝtstampo/ por sendi la konkursaĵojn estas la 30a de septembro 1982.
La verdikto publikiĝos en la Tago de Zamenhof, la 15an de decembro 1982.

Oni sendu la tekstojn al Inés Gastón, Pº de la Constitución, 35, 4º dcha. Z A R A G O Z A 1, Hispanujo.

\- - - - - -

Sporta Asocio DELTANA /P.O.Box 10, R-8829 Sulina, Rumanio/ organizas IIIan eldonon de la PERKORESPONDA DELTA ŜAKTURNIRO, al kiu varme invitas ŝakludantojn el Ĉeĥoslovakio.

Enskribo ĝis 15-10-1982, senkosta por eksterlandaj partoprenantoj, kiuj ankaŭ senpage ricevos ŝakrevueton DELTANA, kiu krom E-kurso por komencantoj enhavos kelkajn paĝojn en E.

Oficiala lingvo de la turniro estas E s p e r a n t o.

## el fervojista movado

### 16a KONFERENCO DE F E R V O J I S T A SEKCIO DE ĈEA

Urbo D a v l e bovenigis unu monaton antaŭ la 4a kongreso de ĈEA 31 membrojn de Fervojista sekcio kun gastoj el Aŭstrio, GDR kaj Slovakio. Ĉeestis ankaŭ la prezidanto de ĈEA d-ro Jermář kaj membro de la CK de ĈEA Novák. La konferencon salutis



reprezentantoj de invititaj fervojistaj sekcioj. Ĉefan raporton prezentis ĝisnuna prezidanto de la sekcio Jar.Kašparec. Li informis pri trijara periodo, kiu estis tre malagrabla en la historio de la sekcio. Pro malbona laboro de estinta sekretario la sekcio fakte ĉesis ekzisti. Post ŝanĝo de la estraro komencis la sekcio denove funkcii kaj la rezulto estis ankaŭ la 16a konferenco. Poste informis s-ano David, estro de terminara komisiono, pri leksikono kaj ankaŭ li parte tuŝis la historion de TK. Komisionestro dankis al tiuj, kiuj ĉesis funkcii, pro ilia longjara utila laboro.

Dum diskuto menciis la prezidanto de ĈEA d-ro Jermář "nigrajn" jarojn inter la konferencoj kaj detale klarigis kio okazis. Fine de antaŭtagmeza programo elektis membroj kvinmembran estraron de la sekcio. Kiel prezidanto funkcios denove Jar.Kašparec.

Posttagmeza programo temis pri la 33a kongreso de IFEF en Regensburg kaj pri vaporaj lokomotivoj kaj ilia malaperinta gloro.

### Předplatné časopisu Internacia fervojisto

Již 34 let vychází tento časopis jako dvouměsíčník - orgán IFEF. Najdete v něm informace o hnutí železničářů - esperantistů, zajímavosti o železnicích celého světa a před kongresem IFEF také podrobné informace.

IF si předplatili na tento rok členové sekce železničářů. Podařilo se zajistit ještě několik předplatných, která si mohou zabezpečit i další zájemci. Napište si na adresu jednatelky sekce: Jitka Skalická, Koněvova 227, 130 00 Praha 3. Předplatné je 35 Kčs. Tam také posílejte veškerou korespondenci pro železn.sekci.

Budete-li posílat peníze na jakoukoliv akci, používejte výhradně svazovou platenku. Nepoukazujte žádnou platbu na soukromou adresu.

### PSČ a správné adresy

Když jsem pomáhal v expedici Starta 1/82, všiml jsem si adres našich členů. Nedivím se, že se některé zásilky vrací zpět do svazu. Neúplné adresy, hlavně v nových pražských sídlištích a připojených obcích, nesprávná PSČ, jsou toho hlavní příčinou.

Je to tak nesnadné nahlásit přesnou adresu? Obdobně je tak i s poukázkami. Jsou často bez označení platby a pracovnice sekretariátu mají uhodnout účel platby. Uvědomuje si plátce, že z banky přijde v obálce i 100 ústřižků poukázek v jednom dni a hledat potom za co kdo platí, to opravdu je velká ztráta času. Nepořádní jsou i někteří členové sekce železničářů. Na ně také apeluji: dejte si všechny náležitosti do pořádku, ať jdou členové sekce příkladem!

Jar.Kašparec

# TURISMA MONDO



**STAŇTE SE I VY PRŮVODCI DCK REKREA V ESPERANTU**

ČES uzavřel významnou dohodu s DCK REKREA o spolupráci při organizování turistických akcí prostřednictvím esperanta. Znamená to, že praktické používání esperanta se dostává na profesionální úroveň a je samozřejmé, že cestovní kancelář musí vyžadovat profesionální úroveň i od průvodců.

Všechny cestovní kanceláře v ČSSR provádějí přezkoušení průvodců a teprve na základě úspěšné zkoušky jim vydává osvědčení, průvodcovský odznak a jednotlivé cestovní kanceláře s nimi uzavírají dohodu o zaměstnaneckém poměru.

Je zapotřebí, aby dostatečný počet esperantistů získal kvalifikační osvědčení průvodců, aby byly dobře zajištěny všechny akce esperantského cestovního ruchu.

Přinášíme podrobnější informace, které jsme získali při jednání s DCK Rekrea. Zájemci, kteří nejsou průvodci, musí projít kvalifikačními zkouškami, než jsou zařazeni do kursů průvodců. Zkoušky jsou organizovány krajskou zkušební komisí Institutu obchodní výchovy.

Soubor otázek je rozdělen do 6 oblastí:

1/ Základy politického a společenského života
2/ Ekonomika ČSSR, životní úroveň
3/ Praha - hlavní město ČSSR
4/ Historie, kultura, umění
5/ Geografie ČSSR
6/ Ekonomika, organizace a technika cestovního ruchu.

Přehled doporučené literatury pro kvalifikační přípravu průvodců je k dispozici v Českém esperantském svazu 110 00 Praha 1, Jilská 10.

Zkoušky jsou písemné a neznámkují se, rozlišuje se pouze "prospěl" nebo "neprospěl". Samozřejmou nutností ovšem je dobré esperanto, případně i další jazyky. Zájemci jsou po úspěšné zkoušce zařazeni do kursů. Kurs probíhá vždy na podzim 2x týdně po 3 hodinách /mimo pondělí a pátek/ a přibližně trvá 4 měsíce. Přihlášky nutno zaslat vždy do 30.září kalendářního roku s vyplněným kádrovým dotazníkem, životopisem, výpisem z trestního rejstříku, souhlasem zaměstnavatele, dokladem o posledním dosaženém vzdělání /maturitní vysvědčení, diplom/, 3 fotografiemi a potvrzením lékaře o dobrém zdravotním stavu.

\- - - - - -

**ESPERANTO - RENKONTIĜO en D R E S D E N**

Je la 18a kaj 19a de septembro 1982 okazos en la urbo Dresden dutaga Esperanto-renkontiĝo. Partoprenkotizoj estas 30 markoj sen tranoktado. La tranokto kostas 12,50 markojn por unu nokto.



Interesuloj petu la aliĝilojn kaj detalajn informojn ĉe jena adreso: Kulturbund der DDR, Kreisverband Esperanto
DDR - 8016 D r e s d e n, PF 44

\- - - - - -

**Invitas vin INTERNACIA ESPERANTO-*KURSEJO*** *

P r o g r a m o 1982

SMOLJAN /PISANICA/- dusemajnaj kursoj: majo 3-16, 17-30; junio 1-14, 16-29; julio 1-14, 16-29; septembro 1-14, 16-29; oktobro 1-14, 16-29; decembro 1-14, 15-28.
dektaga kurso: aŭgusto 1-10.
dudektaga kurso: aŭgusto 11-30.

P r e z o j:
Por dusemajnaj: 2 050 Kčs /ĉambro kun 2 litoj/, 1 750 Kčs /ĉambro kun 3-4 litoj/, Kčs 1550 /kun 6-8 litoj/.
Por dektaga: 1550 Kčs /ĉambro kun 2 litoj/, 1300 Kčs /kun 3-4 litoj/, 1080 Kčs /kun 6-8 litoj/.
Por dudektaga: 2950 Kčs /ĉambro kun 2 litoj/, 2550 Kčs /kun 3-4 litoj/, 2100 Kčs /kun 6-8 litoj/.

En la programo: kvar lernohoroj potage, vizito al Smoljan kaj planedario, al Pamporovo kaj veturo per lifto al la supro "Snejanka", al vilaĝo Mogilica, al la Trigrad-intermonto kaj al la groto "Gorĝo de la diablo", aliaj ekskursoj, sportludoj, diskoteko, diafilmoj, gajaj vesperoj, prelegoj k.a.

Renkonto al la Novjaro 1983:
La 29an de decembro 1982 - la 2an de januaro 1983.
Prezoj: 900 Kčs /ĉambro kun 2 litoj/, 800 Kčs /kun 3-4 litoj/, 700 Kčs /kun 6-8 litoj/.

En la programo: novjara balo, vizito al Smoljan kaj planedario, al Pamporovo kaj veturo per lifto al la supro "Snejanka".

VARNA /ORAJ SABLOJ/- dusemajnaj kursoj: majo 3-16, 17-30; junio 1-14, 16-29; septembro 1-14, 16-29; oktobro 1-14, 16-29.
Prezoj: por majo kaj oktobro 2150 Kčs /ĉambro kun 2 litoj/, por junio kaj septembro 2450 Kčs /kun 2 litoj/ kaj 2200 /kun 3 litoj/.

En la programo: tri lernohoroj potage, plaĝo, vizito al Varna, Balĉik, Tolbuĥin, aliaj ekskursoj, sportludoj, diskoteko, diafilmoj, gajaj vesperoj, prelegoj k.a.

P e r a s Ĉeĥa Esperanto-Asocio 110 00 PRAHA 1, Jilská 10.
La prezoj ne inkluzivas veturkostojn kaj poŝmonon.




S E F T '82 = SOMERA ESPERANTISTA FAMILIA T E N D A R O

Tempo : 21a ĝis 28a de aŭgusto 1982
Loko: Tendumejo C-86 Thomsdorf en norda GDR, ĉirkaŭ 35 km oriente de urbo Neustrelitz /sude de urbeto Feldberg/.
Kondiĉoj:-SEFT estas kuna tendaro de Esperantistoj surbaze de memprizorgo, do ĉiu devas esti absolute memstara /tendo, manĝo, programo/,
-kiel unikan servon la Distrikta Estraro Esperanto nur peras la adresojn inter la tendumantoj.
I n f o r m o j n petu ĉe: Werner Pfennig, GDR-2000 NEUBRANDENBURG, Leibnitzstr. 5/67

- - - - - -

## Scienc-teĥnika sekcio de ĈEA



Redaktas: V. Novobilský, Školní 5, CS-400 01 Ústí nad Labem

SAEST '82 /Seminario pri apliko de Esperanto en scienco kaj teĥniko/ okazos 1982-08-13/15 en České Budějovice, kaj pritraktos la ĉeftemon "Energio-la tutmonda problemo". Krome laboros sekcio dediĉita al problemoj de fakaj terminologio kaj tradukado.
Aliĝu ĉe Český esperantský svaz, Jilská 10, CS-110 00 PRAHA 1. La aliĝokotizo inkluzivas 2 tranoktojn kaj prelegkolekton. Ĝi kostos por translimaj partoprenontoj 170 Kčs kaj por enlandanoj 110 Kčs; eblas mendi tranokton por plua tago por 55 Kčs, resp. 25 Kčs. Eksterlandanoj pagos surloke, enlandanoj pagos per poŝtpagilo de ĈEA.
Dum SAEST '82 estos prezentitaj jenaj prelegoj:
Simon K.H., Kutz J.: Al kelkaj energiproblemoj el la vidο de la arbarmastrumado.
Svoboda M.: Energiuzado de arba biomaso.
Marinov H.: Sunenergetiko kaj ekologia estonteco de la mondo.
Kavka J.: Fonolitoj kontribuas al ŝparado de energio.
Székely A.: Energiofontoj kaj ilia estonteco.
Dudich E.: La energio-krizo kiel stimulo de la scienca kaj teĥnika progreso.
Polák Z.: Kelke da rimarkoj pri energi-mastrumado en ĈSSR.
Muraŝko O.I., Kravčuk N.A.: Kaŝita fonto de energio.
Todorov P.: Ŝuninstalaĵoj por varma akvo - hejmaj kaj industribezonoj.
Pospíšil J. kaj kolektivo: Aviado.
Partecke R.: Energikonsumo en la aertrafiko kaj eblecoj de energiŝparado.
Dehler W.: Tezoj pri terminologio.
Píč K.: Lingvaj rimedoj de la Esperanta prozo.
Plehn H.J.: Planlingvo, ĉu filologia artaĵo aŭ teĥnika instrumento.




Buza B.: La Zamenhofa spirito de la fakvort-kreado.
Kelkaj aliaj prelegoj estas nur alvenontaj.

- - - - -

Okaze de la 4a kongreso de ĈEA en Pardubice /1982-03-19/21/ raportis pri la agado de STS ĝia prezidanto d-ro inĝ L.Fritsch. /Multobligita teksto de la jarraporto 1981 kaj laborplano 1982 estas dissendita al ĉiu membro de la sekcio/. Laŭ propono de la ĝisnuna prezidanto de STS kaj surbaze de aprobo de la CK de ĈEA en Pardubice okazis du ŝanĝoj en la funkcioj de STS-komitato:
prezidanto: doc. d-ro Vlastimil Novobilský, CSc.
vicprezidanto: d-ro inĝ Ludvík Fritsch.

- - - - -



## ni recenzas

Vjetnamio: Kiaj homaj rajtoj? Eldonis: Periodaĵo Vjetnama Kuriero kaj Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio - Hanojo, 1981. Esperantigis Minh Kinh. Paĝoj 145, formato 10,5 x 17 cm, broŝurita.

Tiu ĉi libreto informas nin en 9 artikoloj de diversaj aŭtoroj pri la stato de Vjetnamio post la venko super la usona agreso kaj la reunuigo de la suda kaj norda ŝtatopartoj. Ni ekscias, kian teruran heredaĵon postlasis la fiaskinta marioneta sud-vjetnama reĝimo. La senmoraligita loĝantaro far la usona "vivstilo", kun centmiloj da prostituitinoj, laborevitaj individuoj, negocaĉuloj, drogitoj, prezentis preman problemon. Nur en Sajgono estis 50 000 heroin-uzantoj, tio estas laŭvice dua loko en la mondo, tuj post Honkongo! La ĉapitroj rakontas kiel saĝe la registaro de Vjetnama Socialisma Respubliko klopodas reeduki la centmilojn, kiuj dungitaj kaj varbitaj korupte, ĉantaĝe aŭ miseduke batalis kun la usonanoj kontraŭ la popolan armeon aŭ fiservis al la agresintoj. Sen ia ajn venĝemo, duraj punoj oni klopodas integrigi tiujn homojn en la novan socialisman sociordon kaj reeduki en tiucelaj kampadejoj. La interesan broŝuron en perfekta traduko sen tro multaj preseraroj mi povas rekomendi.

Jiří Kořínek

Ridi vjetname. Kolekto "Hibisko". Aperis en Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, 1981. Broŝuro 66-paĝa, formato 12 x 16 cm.

Jen 35 kurtaj fabeloj, legendoj kaj rakontetoj unu-du-paĝaj. Inter ili estas 2-3 anekdotecaj, la ceteraj prezentas iom senpretendajn fabelaĵojn. La lingvo estas relative korekta, escepte kelkajn strangaĵojn kiel "...li iras ĉe fabrikanto...","...venas ĉe kampulo...", kie oni dirus "...al fabrikanto...","...al kampulo..."/aŭ, ĉar ja kien? - ĉe la kampulon, ĉe la fabrikanton/. Pluraj fabeletoj komenciĝas: "Tiu milita mandareno...", "Tiu tajlor-lernanto...", kie oni kutimas diri "Iu...", sed tio ja povas esti vjetnamlingva konservinda apartaĵo. La kurtaj tekstoj povus taŭgi por kursoj.

Jiří Kořínek

**La medicino dum 1300-jara historio de Bulgario.** Eldonis Bulgara E-Asocio.

Temas pri verko de kolektivo da aŭtoroj, kiu estis enmanigita al la partoprenintoj de la IIa internacia medicina konferenco en Ruse 15-19.VII.1981, 97-paĝa broŝura libreto, presfote farita laŭ maŝinskriba teksto ornamita per kelkaj fotografaĵoj kaj desegnaĵoj. Nian admiron elvokas la priskribo de medicinaj historiaĵoj kaj tradicio de bulgara medicina arto. Detale estas priskribitaj unuopaj evolupaŝoj dekomence laŭ tracaj esplorfosadoj apud Luben, prabulgara kaj slava kulturo, medicino en kadro de mezepoka ŝtato, nacia renesanco, sub otomana jugo, nacia liberigo, ĝis sanprotekto de la liberigita ŝtato kaj lasta fazo de socialisma medicino, esplorsukcesoj kaj organizo de sanprotekto post 9.IX.'44. Aldonitaj estas interesaj priskriboj de famiĝintaj bulgaraj medikamentoj kaj historio de bulgara Ruĝa Kruco. Libro estas tre leginda kaj donas al la leganto detalan rigardon pri la kvalito kaj historio de bulgara medicino, pri kiu ni certe ne estis tiom amplekse informitaj.

Formo, lingvo kaj stilo senriproĉaj, kelkaj tajperaroj.

-JH-

**Poemaro Nokto**, eldonis Poemo Esperanto, Japanujo 1981, 45-paĝa broŝuro.

Kolekto de 31 originalaj kaj tradukitaj poemoj, de japanaj kaj eŭropaj aŭtoroj, unu poemo estas brazila. Ili estas de tre diversa nivelo, kelkaj havas eĉ morfologian kaj sintakse stilistikan mankon ekz.:"Kial falis fulmojn sur infanoj ludante en ĝardeno?" p.9., "Vegetaloj povas florigi sur si florojn, homoj estas malsuperaj ol la vegetaloj" p.20., parte eble ŝulditaj al preseraroj: "ni vidis malsupren" p.24., "ni unuiĝu niajn manojn" p.17.

Plejparte estas poemetoj legeblaj, kompreneblaj, en malpeza, libera versoformo, ekz. tiuj de Germaine Hoffmann, Wolfgang Göpel, de multaj japanaj aŭtoroj. Varme sincera estas poezio de Zora Heide.

Kvin tradukitaj poemoj atestas pri strebo trafi la enhavon kaj internan etoson de originaloj, kelkfoje tradukitaj klopode ĝisvorte, sed plejparte kun evidenta poezia sento.

Temoj kaj semantika enhavo de libreto tre varias ekde intima kaj natura liriko /"Al Ala","Nenio","Vespero","Pluv'","En sonĝo"/ ĝis sociale orientitaj versoj /"Poemo dediĉita al la infanaj viktimoj de atombombo","Prosperos nova komenco","Tempas rikolti", "Sorto infana","Kontraŭ la perforto"/.

Kia estas ĉelo de la kolekto? Fakte laŭdinda, ĉar la Societo Poemo Esperanto ebligas al novaj aŭtoroj publikigi siajn kaj legi alies versojn, ĝi donas al legantoj eblecon ekkoni poezian esprimmanieron de diverslandaj aŭtoroj.

dr. Barandovská



# RONDETA VIVO

**OLOMOUC** - urbo riĉa je memorindaĵoj kaj ankaŭ je Esperanto: Klubo de 1911, hejmdomo vilao Esperanto el 1914, "Moraviaj Esperanto-Pioniroj 1913 - 1938, plantita Esperanto-arbo kun Memorŝtono kaj samtempe nomigita strato de D-ro L.L.Zamenhof de 1932. La 50-jaran jubileon ĉe la Memorŝtono ni rememoros per kultura programo okaze de la tutŝtata ekspozicio "Konfeso al rozoj". Venu al Olomouc 10an de julio 1982 !

Vl.Bl.

En la kadro de Patrujscienca muzea societo /Vlastivědná společnost muzejní/ en Olomouc estis kreita speciala laborgrupo, kiu kolektados kaj prilaborados dokumentojn pri la agado de Esp-istoj en Olomouc, se temis pri okazaĵoj havantaj tutsocietan signifon.

Moh.

**ÚSTÍ n.Labem.** Honore al la 390 naskiĝ-datreveno de J.A. Komenský-Comenius okazigis la 25an de marto '82 Pedagogia fakultato kunlabore kun Nordbohemia fako de Pedagogia asocio ĉe Ĉeĥoslovaka akademio de sciencoj sciencan konferencon, kie prezentis duonhoran prelegon doc. d-ro V. Novobilský, CSc. pri interlingvistikaj laboroj de Komenský. La prelego estos publikigita en la preparata preleg-almanako.

## )Lingva angulo(

**DUDEKO DA FAKAJ VORTOJ POR PRAKTIKA UZO /3/**

Laŭ novtempaj fontoj komunikas Ing. J. Werner

aro - množina /mat./
avio - letadlo /těžší vzduchu/
blovegi per sablo - pískovat, otryskávat pískem
hardebakita briko - ostře pálená cihla
kompakta briko - plná cihla
daŭro de uzebleco; funkcidaŭro - životnost
forskvamiĝi - odprýsknout
fuelo - pohonná hmota
fuelujo - nádrž pohonných hmot
fumŝranko - digestoř
hoso - nadice
hurdiso - hurdiska /stav./
/inter/akorda - slučitelný /kompatibilní/
kapaŭdilo - náhlavní sluchátko
koŝo - kabelové oko /el. tech./
kresĉenta - srpovitý
kusineto - ložiskové pouzdro
malhardi - popouštěti /ocel/
pakumo - obal
aerkapta valvo - odvzdušňovací ventil

## DUDEKO DA FAKAJ VORTOJ POR PRAKTIKA UZO /4/

Komunikas Inĝ. J. Werner, hodiaŭ el la aŭtomobil-fako.

antaŭĉaro - přední náprava
bremsogarnaĵo - brzdové obložení
bremsosuo - čelist brzdy
dampilo - tlumič výfuku
ellastubo - výfukové potrubí
erodata motoro - motor v záběhu
frontbufro - přední nárazník
glacoviŝilo - stěrač skel
girindikilo - ukazatel směru, blikač
hupo - houkačka
idlilo - volnoběžka
loĝremorko - obytný přívěs
numerplato - tabulka státní poznávací značky
petveturado - autostop
radpaŝo - rozvor náprav
radŝpuro - rozchod kol
sparkilo - zapalovací svíčka
stirrado - volant
vicpeco - náhradní díl
vicrado - rezervní kolo /rezerva/

## S o v e t a - S o v e t i a

S-ano Leon Zimels el Ternopol USSR atentigas nin, ke oni ofte intermiksas la epiteton soveta kaj sovetia, ja eĉ en artikoloj de elstaraj autoroj. Soveta estas rilata al soveto /t. e. konsilantaro/ ekz. urba, distrikta, Supera soveto de USSR, dum sovetia rilatas al Sovetio, t.e. lando Sovetunio. Oni do distingu inter sovetia reprezentanto, veterano, esperantistaro, kolonelo ks. disde soveta reprezentanto, veterano ks. /t.e. de iu unuopa soveto/.

S-ano Zimels tute pravas kaj tiel distingas soveton de Sovetio ankaŭ PIV. Tia nesevera intermiksado tralikiĝis en Esperanton el kelkaj naciaj lingvoj, kie sovetoj kaj soveta estas ofte uzata kiel rilata al la lando, ŝtato. Iom influas analogioj kun aliaj landnomoj, kie ofte eblas paralele uzi ambaŭ formojn, ekz. jugoslava - jugoslavia, aŭstra - aŭstria delegacio, ĉeĥoslovaka - ĉeĥoslovakia, demokrata - demokratia ks. Tamen ĉe soveta - sovetia ekzistas esenca diferenco en ambaŭ nocioj, rimarkebla precipe al sovetianoj. La uzantoj de adjektivo soveta por la nocio sovetunia povus sin event. defendi per tio, ke laŭ la principo pri Neceso kaj sufiĉo estas el kunteksto kompreneble, ke temas pri "sovetia" laŭ uzkutimo ekster Sovetunio. Sed tio ne ĉiam estas pravigebla kaj oni prefere distingu inter soveta /konsilantara/ kaj sovetia /sovetunia/.

Jiří Kořínek



Komisiono por preso kaj propagando de ĈEA:

## K V I N J A R O J A N T A Ŭ L A J A R C E N T O - 1 8 8 7 - 1 9 8 2

Antaŭ la kongreso de ĈEA ĉiuj lokaj grupoj ricevis tezojn de nia nova propaganda serio. En tiu ĉi aranĝo la komisiono supozas vian pli grandan aktivecon en vasta publika propagando. Komprenu, ke la propagando devas esti subtenata per trafaj kaj konkretaj argumentoj - via informado pri la nuntempa agado de niaj esperantistoj estu celata al ĉiuj ĉeĥaj amaskomunikiloj: gazetoj, ĵurnaloj, radio-elsendado kaj televido. Skribu pri ĉio, kion vi faras - konvinku nian publikon, ke la Esperanto-movado estas same utila kiel ĉiuj institucioj de la ĉeĥa hobia agado. Ankaŭ la ĉeĥlingva mesaĝo de la komisionestro dissendita al ĉiuj rondetoj post la kongreso instigu vin por pli vasta informado de nia neesperantista publiko dum ĉiuj kvin jaroj antaŭ nia jarcento. Sub tiu ĉi titolo vi trovos en ĉiu numero de STARTO liston de la gravaj argumentoj pri niaj lingvo kaj movado legeblaj en la revuoj "ESPERANTO" kaj "PACO". Ne forgesu reagi je ĉiuj mencioj aperantaj en niaj amaskomunikiloj pri la lingva problemo; preventu la misinformojn per liverado de propraj informaj leteroj al la redakcioj. Akcentu la pacideon de nia movado - kaj ekonomiajn avantaĝojn de enkonduko de la internacia lingvo Esperanto.

Taŭgajn argumentojn vi trovos en la lastaj jarkolektoj de la revuo "ESPERANTO" /1980: Nro. 898; 1981: Nroj. 901-912; 1982: Nroj. 913-914/:

1980 - Nro. 898, pĝ. 161: Letero el Irano: 675 geinstruistoj lernas Esperanton; 1981 - Nro. 901, pĝ. 9: "Lingvosciencistoj ja interesiĝas pri Esperanto"; Nro. 903, pĝ. 47: "2300 movadanoj en Rumanio"; Nro. 904, pĝ. 61: "Refortigo de la kontaktoj kun Unesko"; Nro. 905, pĝ. 81: "Budapeŝto por scienco"; Nro. 907/8, pĝ. 130: Detlev Blanke: "Pli konvena organiza formo en GDR"; Nro. 909, pĝ. 143, 144, 146, 148, 149, 153: El materialoj de la 66-a Universala Kongreso en Brazilo /ĉiuj enhavas trafajn kaj modernajn argumentojn!/; Nro. 910, pĝ. 161: "Jubileo kiel invito intensigi la agadon" kaj Komitata Rezolucio pri la Jubilea Jaro; pĝ. 177: pri s-ano Jiří Kořínek; Nro. 911 /"Facila numero por komencantoj" kaj tauga por montri ĝin al la neesperantista publiko!/; 1982: Nro. 913, pĝ. 1: "Prosperan kunlaboron en 1982!"; pĝ. 2: "Kio okazas inter Manilo kaj Meksiko"; Nro. 914, pĝ. 25: "Kion opinias ambasadoroj".

Kopiojn de viaj informaj artikoloj bonvolu sendi al sekretariino de nia komisiono:

Věra H e r z o g o v á , Dlouhoňovice 113, 564 01 Ž a m b e r k

Nia komisiono samtempe volas helpi por la nova, pli preciza kaj pli kompleta a d r e s a r o de ĉiuj ĉeĥaj Esperanto-kluboj, enhavonta ankaŭ adresojn de viaj kunvenejoj kaj informojn pri tagoj kaj horoj de viaj kunvenoj.

Ankaŭ ni volas aranĝi la i n t e r k l u b a n p r u n t a d o n de viaj propraj mg-programoj, filmoj kaj diapozitivoj. Bonvolu tial kompletigi senditajn demandilojn kaj resendi ilin al nia komisiito:

Stanislav L i n h a r t , Kosmonautů 168, 530 09 P a r d u b i c e

Jaroslav K l e m e n t ,
komisionestro

# * JUBILEOJ 1982 *

**Mondaj jubileoj de la Esperanto-movado:**

| | |
|---|---|
| 95 jaroj de ESPERANTO /eldono de la "UNUA LIBRO"/ | 14. 7. 1887 |
| 65 jaroj de la forpaso de D-ro L. L. ZAMENHOF | 14. 4. 1917 |

**Jubileoj de la ĉeĥoslovaka Esperanto-movado:**

a/ **Eventoj:**

1902 - ĵurnalo "Bohema Esperantisto" fondita de J. Krumpholc kaj Th. Čejka /80-a jubileo/
9. 12. 1902 - Esperanto-klubo en Praha fondita /80-a jubileo/
1907 - la unua slovaka lernolibro de D-ro A. Škarvan eldonita /75-a jubileo/
1912 - la unua ĉeĥa laborista Esperanto-ĵurnalo fondita de J. F. Chaloupecký sub nomo "KULTURO" /70-a jubileo/
1912 - la unua eŭropa prelegvojaĝo pri Esperanto de Ph Dr Augustin Pitlík /70-a jubileo/
1922 - laborista Esperanto-asocio en Ústí n/L fondita /60 j./
1922 - societo de ĉs. blinduloj-esperantistoj fondita /60 j./
1922 - lektorejo de Esperanto en kadro de Ĉeĥa Teknika Altlernejo fondita de D-ro Pitlík /60-a jubileo/
1927 - radioelsendado de la Esperanto-kursoj en Brno fondita /55-a jubileo/
1927 - internacia faka konferenco pere de Esperanto kun temo "Paco per Lernejo" en Praha /55-a jubileo/
1937 - antaŭkongreso de la 29-a Universala Kongreso en Praha /45-a jubileo/
1952 - novaj someraj Esperanto-tendaroj fonditaj merite de EK en Třebíč kaj Opava

b/ **Personoj:**

9. 7. 1872 - naskiĝis Josef SOCHA, lernejdirektoro en Litovel, esperantisto de 1893, pioniro de E-movado en Moravio /110-a jubileo/
14. 3. 1882 - naskiĝis Josef PECH, elstara esperantisto en Plzeň, fama vojaĝanto pere de Esperanto /100-a jubileo/
21. 11. 1882 - naskiĝis František PÁTEK, lerneja inspektoro, pedagogia verkisto, pioniro de Esperanto en lernejoj, autoro de la nova lernolibro de Esperanto por lerneja junularo /100-a jubileo/



26. 7. 1887 - naskiĝis Emil V. MÜLLER, pioniro de Esperanto, kunfondinto kaj longjara prezidanto de EK Praha-Malá Strana, talenta komponisto muzikiginta "Preĝon sub la verda standardo" /95-a jubileo/
12. 2. 1892 - naskiĝis prof. Vlado JUKL, elstara ĉeĥa pioniro kaj Esperanto-aktivulo en Rusujo /90-a jubileo/
13. 1. 1962 - forpasis Hynek K. BOUŠKA, fama ĉeĥa esperantisto, autoro de lernolibroj /20-a jubileo/
15. 2. 1892 - naskiĝis Ján VALAŠTAN-DOLINSKÝ, elstara slovaka verkisto /90-a jubileo/
29. 4. 1892 - naskiĝis Jaroslav MASTNÝ, unu el "Moraviaj Esperanto-Pioniroj" /90-a jubileo/
9. 4. 1902 - naskiĝis Rudolf BURDA, kunfondinto de MEM kaj ĝia unua prezidanto. Fondinto de la societo de germanaj esperantistoj en Plzen /"Liberiga Stelo" de SAT/ kaj Laboristan Ligon de Esp-istoj en Plzen /prezidanto Josef Pech/. Li unuafoje aplikis Esperanton por la porpaca batalo /fondinto de "La Pacdefendanto", antaŭulo de "Paco"/ kaj tiel multe helpis al la E-movado en socialismaj landoj. Por la kontraŭmilita kampanjo de Albert Schweitzer li kolektis 10 mil subskribojn. /80 jaroj/
10. 4. 1922 - forpasis Jiří František CHALOUPECKÝ, kunfondinto de la ĉeĥa laborista Esperanto-movado /60-a jubileo
7. 5. 1942 - en Mauthausen estis ekzekutita D-ro Jaroslav NOVOBILSKY, elstara esperantisto, patro de doc. D-ro Novobilský /40-a jubileo/
5. 9. 1942 - forpasis en nazia koncentrejo Tonča MRÁZKOVÁ, elstara ĉeĥa esperantistino /40-a jubileo/
1942 - en Plötzensee ekzekutita Inĝ. Antonín SLAVÍK, elstara ĉeĥa esperantisto /40-a jubileo/

**Ĉeĥaj kulturaj jubileoj:**

1332 - naskiĝis Petr PARLÉŘ, ĉeĥa gotika arkitekto kaj skulptisto, autoro de multaj gotikstilaj konstruaĵoj en Praha, elstara arkitekto de la periodo de Karolo la IV-a /650-a jubileo/
4. 4. 1832 - naskiĝis Josef ZÍTEK, kreinto de nacia ĉeĥa arkitekturo, projektinto de Nacia Teatro kaj de Kolonaro en Karlovy Vary /150-a jubileo/
12. 12. 1882 - naskiĝis Jiří MAHEN, ĉeĥa verkisto, poeto, dramatikisto, ĵurnalisto kaj gvida persono de la kultura vivo en Brno /100-a jubileo/
31. 7. 1882 - naskiĝis EMIL FILLA, moderna ĉeĥa pentristo /100 j./
7. 6. 1882 - naskiĝis Rudolf TĚSNOHLÍDEK, ĉeĥa verkisto kaj ĵurnalisto, autoro de "Vulpino Bystrouška" /100-a jubileo/
9. 12. 1862 - naskiĝis Karel KOVAŘOVIC, ĉeĥa komponisto kaj dirigento, operestro de Nacia Teatro en Praha /120 jaroj/

28. 5. 1762 - naskiĝis Matěj KOPECKÝ, pioniro de ĉeĥa pupteatro /220-a jubileo/

29. 3. 1832 - naskiĝis Julius Edvard MAŘÁK, ĉeĥa pentristo kaj grafikisto /150-a jubileo/

1942 - estis skribita "Riporto sur la pendumila maŝo" de Julius FUČÍK /40-a jubileo/

1882 - premiero de la ciklo de la simfoniaj poemoj "MIA PATRUJO" de Bedřich SMETANA /100-a jubileo/

## NIA KONKURSO 10x RESPONDU

Ĝustaj respondoj /STARTO 1/'82/

1. 12-12-1859 en Bialystok
2. La 26an de julio 1887 en Varsovio
3. En Nurenbergo 1889 Leopold Enŝtejn
4. UEA - Universala Esperanto-Asocio
   MEM - Mondpaca Esperantista Movado
   TEJO - Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
   IFEF - Internacia Fervojista Esperanto-Federacio
   ĈEA - Ĉeĥa Esperanto-Asocio
   ASE - Asocio de Sovetaj Esperantistoj
   AE SSR - Asocio de Esperantistoj en Slovaka SR
5. 1905-Boulogne-sur-Mer, Francujo
6. K.Kalocsay, G.Waringhien,prof.
7. aperis 29 libroj
8. 29-30a marto 1969 en Brno
9. en 1893 laŭ propono de L.de Beaufront
10. Ekde la jaro 1925

El la respondoj, kiujn ni ricevis, bedaŭrinde n e n i u estis perfekta.

N o v a j   d e m a n d o j:

1. En kiu urbo kaj kiam estis fondita la unua E-muzeo? Kiu ĝin fondis?
2. Kiel aspektas precize la esperantista standardo?
3. Pri kiom da projektoj de internaciaj lingvoj oni scias?
4. Kiom da internaciaj E-organizaĵoj nuntempe mondskale ekzistas?
5. En kiu jaro estis fondita UEA?
6. Kiom da Esperantistoj partoprenis la Unuan E-kongreson?
7. Kiuj plej gravaj problemoj estis solvitaj dum la Unua kongreso?
8. Kiu iniciatis organizon de la unua faka konferenco?
9. Nomu kelkajn originalajn verkojn de L.Zamenhof.
10. En kiu jaro kaj en kiu lingvo aperis la unua E-ŝlosilo?

T r i   s u k c e s a j   solvintoj ricevos belan libron. Viajn respondojn sendu dum unuaj sep tagoj post ricevo de STARTO 2/82.

- - - - - -



## el leterkesto

El la letero de ing J. Emil:

Mortis meritplena Esperantisto.

En monato februaro ni ricevis tristan sciigon: mortis s-ano Jindřich Š t a n c l, modesta kaj oferema homo, kiu plene ekkomprenis la signifon de Esperanto.

Esperanton li komencis lerni post la Dua mondmilito. En la jaro 1960 li estis kunfondinto de la Loka grupo "Amikeco" en Česká Třebová kaj iĝis eminenta en multaj respondecaj funkcioj. Dum sia preskaŭ 15-jara pedagogia agado li edukis longan vicon de Esperantistoj.

La movado pro la forpaso de tiu ĉi bona homo perdis homon karan,laboreman, kiu faris vere multon por disvastigo de Esperanto. Li restu modelo por ĉiuj, kiuj transprenas liajn taskojn.

## INFORMOJ EL SEKRETARIEJO

RADIO P É C S, la regiona studio de Hungara Radio ĉi-jare regule disaŭdigos esperantlingvan programon en j u n i o, j u l i o kaj a ŭ g u s t o. La elsendoj okazos ĉiun vendredon inter 18,25 kaj 18,30, laŭ la somera hungara tempo /GMT 16,25-16,30/. La unua programo estos aŭdebla la 4-an de junio, la lasta la 27-an de aŭgusto. Radio Pécs estas kaptebla laŭ la meza ondo 344 metra /873 kHz/ kaj laŭ la ultrakurtondo 67,19 MHz, en la suda parto de Hungarujo.

La leteroj de aŭskultantoj ankaŭ ĉi-jare estas tre bonvenaj. Adreso: Radio Pécs, Esperanto-programo, Pécs, Pf.200, H-7601.

42a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO okazos en la andaluza urbo M a l a g a de la 16a ĝis la 22a de julio 1982.

SEMINARIO PRI LA SPORTO. Profitante la okazigon de la Tutmonda Futbala Ĉampioneco Madrida Esperanto-Liceo /Atocha, 98 4ª MADRID 12/ aranĝos inter la 6a -13a de julio 1982 Seminarion pri la sporto en la moderna socio. Traktadlingvo:Esperanto.

TRE GRAVA DECIDO EN SVEDIO. Por la unua fojo Esperanto eniros la ordinaran lernejan programon kaj havos saman statuson kiel ekz. franca kaj germana lingvoj! Tion decidis en kunsido la komunuma lerneja estraro en N y k ö p i n g. La adreso de la gratulenda instanco estas Skolstyrelsen i Nyköpings kommun, Fack, S - 611 83 NYKÖPING, Svedio

FREINET-PEDAGOGIO. Inter la 10a kaj 24a julio 1982 okazos ICEM-Renkonto por koni kaj vidi la Freinet-Pedagogion, apud Budapeŝto, Hungario. Interesuloj el socialistaj landoj informiĝu ĉe: Gabriella ÖSZ, Hengelmalon u . 47, H-1116 BUDAPEST, Hungario.

**NIA ASOCIO JAM HAVAS SUFIĈAN KVANTON** de la lernolibroj por infanoj de 9a jaro. Ĝi estas du voluma/ propra lernolibro kaj tielnomataj "laborfolioj"/ Libro estis konsultita kun la niaj pedagogoj kun favora rezulto. Prezo estas vere simbola -14 Kčs. Formato A5. Libron alkondukas multe da desegnaĵoj. Aŭtoro estas **Ladislav Prachař**, grafika aranĝo kaj desegnaĵoj de **ing.Zd. Novotný**. La lernolibron vi povas tuj mendi ĉe nia asocio. Eksterlandaj interesuloj ĉe niaj perantoj. Prezo en gld. 4.-

NIA LIBROVENDEJO RICEVIS MULTE DE NOVAJ kaj de vi serĉataj titoloj. Inter ili ni ricevis sufiĉan kvanton el Pollando. Ilin vi trovos ankaŭ sur aldonita mendilo. Ne hezitu kaj mendu ilin!

JAM ANKAŬ APERIS " Sur la du frontoj " - skiza studo kaj faktoj pri la laborista esperantista movado. Prezo estas nur modesta 4.-Kčs/ aŭ 1,2 gld/. En ĝi vi trovos historiajn materialojn ne nur pri nia enlanda laborista E-o movado. Sendu ĝin al viaj eksterlandaj amikoj kaj argumentu kun tiu materialo dum diversaj okazoj. Estus bona prepari laŭ ĝi unu el viaj vesperaj klubaj programoj.

La libroj pri eŭ el Vjetnamio estas nun preparitaj por la konto de solidareco. La tuta enspezo el la vendo de tiuj libroj estos dediĉita al helpo de nia patroneca lernejo en Hanoj. Atendas vin tiuj ĉarmaj malgrandaj libretoj kun riĉa enhavo. Iliaj titoloj estas sur la PK pere de kiu vi povas ilin mendi.

SOCIOLOGIA ESPLORO DE SINTENOJ

ni eldonis jam kiel broŝuron - prese kun ĉarmaj desegnoj de P.Rak; ĝi vere estas unukaĵo en tiu senco. Neniam en la mondo ĝis nun ni tiel vaste povas science okupiĝi pri diversaj kialoj.kiuj finfine formas la sintenojn de la homoj al Esperanto. Ĉiu,kiu volas pli scii, kiu volas vere serioze okupiĝi pri disvastiĝo de la esperanta movado devas tiun broŝuron tralegi. Formato A5- enhavas 60 paĝojn + kovrilon.kiu estas dukolora. Prezo 10.-Kčs aŭ 2,8 gld.

MEKSIKA ESPERANTO FEDERACIO

komencis eldonadi propran Bultenon. Ili serĉas kontaktojn en la tuta mondo. Do kiu interesiĝas pri la meksika E-o movado skribu rekte al la : MEF, Apartado Postal 10576. Mexico.D.F. 06000. La direktoro de BULTENO estas Emilio Arias Carcia.

EKONOMIA BULTENO PRI USONO

estas titolo de ege interesa legaĵo.kiun ni ĉiumonate ricevas el USA. En ĝi vi povas legi pri resumo de estinta monato en la sferoj de " REGISTARAJ AFEROJ.FINANCAJ AFEROJ, KOMERCO KAJ INDUSTRIO, LABORANTOJ KAJ SINDIKATOJ. INTERNACIA KOMERCO". Jarabono estas nur 10 US dol. Kiu havas eblecon mendu ĝin ĉe adreso : 70008 Millwood Road.Bethesda, Md. 20034.USA- Ekonomia Bulteno .

EL JUNULARA MONDO

38.Kongreso de TEJO. 31.7 - 7.8.1982 en Luven. Belgio. Temo estos la.rilatoj inter scienco kaj socio. Informoj 38a IJK, Duisburgsestraat 12. B-3030 LEUVEN



Internacia Junulara E-o Renkontiĝo de 4.-10.4 estis en Nyiregyhaza, Hungario

Junulara Esperanto Lernejo de 4.-17.07. en Bardejov.Aliĝlimo estas 30 jaroj. Informoj ĉe S.Marček,Zvolenská 15. CS-036 01 Martin.

Pasporta servo de TEJO listiĝas en sia lasta eldono 412 junaj gastigantoj el 48 landoj. Informoj ĉe J.M. Cash.5 rue des Felibres. F-31520 Ramonville St. Agne.

La Pedagogia Altlernejo en Szombathely/Hungario/ havas studentan E-o rondon kun c. 30 membroj. La plimulto estas komencantoj.

GRANDA MENDO DE NIAJ LIBROJ

Antaŭ kelke da tagoj ekspedis nia asocio /ĈEA/ sufiĉe grandan kvanton de niaj libroj/ pli ol 4.000 da ekz./ pere de Internacia eksport organizo al eksterlandaj geesperantistoj. Plejgrandan kvanton aĉetis USSR. Do nun jam preskaŭ mankas tiuj titoloj kiel J. Fučík- Riporto skribita en pendumila maŝo, Sudbohemiaj burgoj kaj kasteloj, La perdita vizaĝo kaj Meze de Eŭropo. Tamen,kiu ankoraŭ ne havas tiujn titolojn skribu rapide al ni. Oni antaŭvidas ankaŭ mendon de la novaj titoloj kiel K.Čapek : Rakontoj..

ĈIUJ KIUJ INTERESIĜAS pri laboro en junulara sekcio de ĈEA,kiu estis nun novfondita tuj skribu al adreso de M. Malovec/ vidu la liston de funkciuloj /!!!

## KORESPONDI DEZIRAS ANONCOJ

Por ĉiuj 25 vortoj vi pagos 15 Kčs aŭ 5 irpk. Abonantoj el eksterlando turniĝu al viaj perantoj pri detalaj informoj!

16-jara lernantino kun intereso pri lingvoj, PI, poŝtmarkoj, volonte korespondos tutmonde: Kristina Brandes 2794 SCHWERIN, Leninallee 168, D D R.

39-jara dipl.inĝeniero serĉas sinceran amikon por koniĝi per korespondado kaj reciproka gastado, kun homoj kaj kulturo de ČSSR. Krome li deziras regule kaj kontinue interŝanĝi noveldonitajn poŝtmarkojn. Werner I t t i g , Auenstrasse 60 DDR - 6016 S U H L .

Deziras korespondi kun knabino 11j. Elena Ĥristova Mladenova, 3043 ČEPOVEK, Vračanski okr. Bulgario

Kun knabino 12j.Petja Georgieva Cenova, 3044 PAVOLČE, okr. Vračanski, Bulgario

Korespondi deziras 14j.Veronika Rapsch, 1950 NEURUPPIN, Fr.Engels-Str.13, D D R.

Kun 10-15 jaraj geknaboj Balogh Ferenc, BUDAPEST, Tomori 2, 1131 Hungario.

21jara flegistino Zofia JEDRZEJCZYK Zagorze, 05-462 Wiazowna W a r s z a w a , Pollando.

42jara ekonomistino Alicja Jozwiak kor.kaj interŝanĝos poŝtmarkojn k.t.m.,adreso WROCLAW 54-220 str.Bobna 16m 16 Pollando.

53jara Inĝ.Waldemar S a d o, ul. Batovego 39-19 PL-00 613 WARSZAWA, Pollando. interesas pri historio, filatelo, turismo, bildkartoj.

19jara univers.studentino koresp. pri lingvoj kaj historio: 614001 USSR, P E R M , str.Bolŝevistskaja, 98-23 Ĵ E L N I N A Marina.

KOLEKTANTOJ !

Sendu stampitajn poŝtmarkojn de USA, KANADO,FRG, por miaj stampitaj de ĈSSR,USSR,GDR, La samajn PM mi sendos ankaŭ por insignoj de hokeo-kluboj de ameriko-kanada nacia hokea ligo. Mi interŝanĝas ankaŭ 100 kontraŭ 100 PM de la tuta mondo. Skribu al: Jan Bednárek,Hrenická 21. CS-742 35 ODRY.

Knabo 17 jaraĝa dezires korespondi kaj inter.PM:GINTARAS ŽIAUNYS . str. ŽEMAITIJOS 9-25. SU-235500 MAŽEIKIAS 1.

**ANONCO,PROPONO,ATENTIGO !!!!**

Kvinpersona muzikgrupo,kiun vi jam eble konas sub trafa titolo " LA BARBULOJ " ankaŭ por via klubo, arango,kunveno kaj pluaj eventoj preparos bonan,gajan programon el konataj kantoj / en esperanta traduko de la tekstoj / ĝis 2-horan. Nuraj kondiĉoj : kovrigi simplajn restadkostojn kaj vojaĝelspezojn. Tio valoras ankaŭ por eksterlando. Ne hezitu kaj jam nun vi skribu al adreso de nia asocio.

Sian novan adreson anoncas s-ano Renato CORSETTI, Via delle Cave, 82/C 00181 R O M A, Italujo.

Interesiĝantoj pri la revuoj FONTO, LITERATURA FOIRO, PLANLINGVISTIKO kaj MONATO informiĝu ĉe Stano M a r č e k, Zvolenská 15 , CS-036 01 M A R T I N telefono 89626

Esperantistaj societoj "Vekiĝo", "Sano" kaj "Progreso" poŝtkesto 60, 9700 Ŝ U M E N, Bulgario, aranĝos dum junio solenaĵon okaze de la 100-jara naskiĝo de Georgi D i m i t r o v. Sendu salutleterojn, rememorojn kaj ĉiuspecajn materialojn pri li el la landa gazetaro ktp. Ĉiu kontribuinto ricevos respondon.

Helpu al mi kompletigi kolektojn de Starto, Ĉeĥoslovaka gazeto k.t.p. Mi aĉetos aŭ interŝanĝos mankantajn numerojn. Ramon MOLERA, Sta.Joaquina, 13 - MOIÂ /Barcelona/ - Hispanio.

KTERÝ DŮCHODCE/ důchodkyně/ mě naučí esperanto v dopoledních hodinách? Volejte č.tel.2298984 v Praze. M. Svítková,Pernerova 18. 180 00 Praha 8.

DONACOJ AL ASOCIO

Ni dankas por mondonacoj al la asocia kaso de :
Karol Zipser 50,-Kčs, P.Rak 450,-Kčs.



NOVAJ FUNKCIULOJ DE ĈEA - ESTRARO

| | | funkcio |
|---|---|---|
| 1. | PhDr Jaromír Jermář CSc . Jabloňová 43 106 00 Praha 10 | ............ prezidando |
| 2. | ing. Vlastimil Kočvara. A.Sovy 10. 746 00 OPAVA | ........ 1-a vicprezidento |
| 3. | Věra Podhradská. Poříčí 1. 602 00 Brno | ....... 2-a vicprezidento |
| 4. | Zdenko Křimský. Slovany 2751 276 01 Mělník | ............ sekretario |
| 5. | Josef Novák.pošt. schr. 103. 466 01 Jablonec n/N. | ............ membro |
| 6. | Stanislav Papírník. Frant.Ondříčka 983. 370 05 České Budějovice | ............ membro |
| 7. | František Patera. Čsl. armády 1027. 508 01 Hořice v Podkrkonoší | ............ membro |

CENTRA KONTROLA KAJ REVIZIA KOMISIONO DE ĈEA

| | | |
|---|---|---|
| 1. | JUDr Zdeněk Rusín. Palackého 1559, 415 01 Teplice | ............ prezidanto |
| 2. | Marie Turková , Vrchlického 7, 320 29 Plzeň | .............vicprezidento |
| 3. | Ludvík Chytil. Spartakiádní 24. 750 00 Přerov | ............ membro |
| 4. | Marie Oplerová. Písečná 19, 748 01 Hlučín | ............ membro |
| 5. | Jiří Patera. Na usedlosti 1534. 147 00 PRAHA 4- Krč | ............ membro |

GVIDESTROJ DE LA KOMISIONOJ KAJ SEKCIOJ DE ĈEA .

| | | |
|---|---|---|
| 1. | politik-eduka komisiono | : Pisk František. nám. Osvobození 19. 674 01 Třebíč/ membro de CK/ |
| 2. | komisiono por preso kaj propagado | : Jaroslav Klement. kpt. Nálepky 7. 360 04 Karlovy Vary/ membro de CK/ |
| 3. | komisiono por turistiko | : Evžen Dadak, 753 73 Louky nad Olší 757/ membro de CK/ |
| 4. | ligva komisiono | : Adolf Staňura, Zápotockého 48. 736 01 Havířov. |
| 5. | komisiono por historio de ligvo kaj movado | : Dr. Jaromír Jermář CSc/membro CK/ |
| 6. | Komisiono por lingvaj ekzamenoj | : Karel Franc. Dukla 2287. 530 02 Pardubice/ membro de CK/ |

SEKCIOJ :

| | | |
|---|---|---|
| 1. por porpaca agado kaj kunlaboro kun MEM | : | Drahomír Kočvara, Hulvátská 18. 704 00 Ostrava / membro de CK/ |
| 2. pedagogia | : | prof. Jaroslav Polenský, Branišovská 25, 370 05 Č.Budějovice |
| 3. por scienco kaj teĥniko | : | doc.Dr. Vlastimil Novobilský CSc, Školní 5, 400 01 Ústí nad Lab. |
| 4. fervojista | : | Jaroslav Kašparec, Vlkova 30. 130 00 Praha 3/ m mbro de CK/ |
| 5. literatur- arta | : | Ladislav Podmele/J.Karen/,Počernická 333/86. 100 00 Praha 10 |
| 6. junulara | : | provizore Miroslav Malovec,Charkovská 7, 625 00 Brno /membro CK/ |
| 7. por blinduloj | : | Jiří Vychodil, endovská 304. 190 00 Praha 9/ membro de CK/ |

Pluaj membroj de CK.kiuj ne haves gvidajn taskojn en la organoj de nia asocio aŭ laboras kiel estroj de la Departementaj komisionoj :

1.Sitteuer Pavel, Znojemská 1128, 674 01 Třebíč /gvidas SET Lančov/
2.Vondráková Jiřina, Bartošova 31, 750 00 Přerov
3.Jupová Marie, 273 62 Družec 110
4.Madzia Karel, 739 58 Oldřichovice 374
5.Staněk František, Žižkova 323, 410 02 Lovosice

Redaktoroj de la asociaj presaĵoj :

| | | |
|---|---|---|
| 1. P A C O | : | ing. Margit Turková. 262 12 Obořiště 138 |
| 2. STARTO | : | provizore sekretario de asocio |
| 3. S A N O | : | MUDr Josef Hradil. Rudé armády 718.295 01 Mnichovo Hradiště |
| 4. PANORAMO | : | ing. Vlastimil Kočvara, 1-a vicprezidanto |

Estas bezone, ke viajn demandojn,proponojn, dezirojn kaj plendojn ĉiam vi sendu al tiu,kiu povas al vi komplete respondi. Ne sendu, do,viajn leterojn al sekretariejo - vi ne povas de tie ricevi bezonatan respondon, ĉar sekretariejo n e r a j t a s enmiksiĝi en fakaj aferoj de la sekcioj aŭ komisionoj.



**EKSPOZICIO - LA PLEJ DEMONSTRA PROPAGANDILO**

**Kiel estis preparata ekspozicio por la IV-a Kongreso de ĈEA**

Metodika-propaganda komisiono de ĈEA jam fine de la jaro 1980 atentigis unuopajn Esperanto-klubojn en ĈSR pri preparo de la asocia - pli ĝuste "kongresa" - ekspozicio. Sed tiam fakte ankoraŭ ne estis klara ĝia koncepto. Ĉu prepari ĝin kiel ekspozicion de la unuopaj kluboj /fakte koncepto de iu "foiro"/ - aŭ konstrui pure oficialan ekspozicion de ĈEA? La tempo mem solvis la problemon: fine de la jaro 1981 ni havis tiom malmulte da materialo el la kluboj, ke ni opiniis prepari la ekspozicion preskaŭ pure grafikan - sed la kongresanoj certe vidis, ke la rezulto staris ie meze inter la du konceptoj.

En la alvoko al la kluboj ni precizigis postulatan materialon: fotografaĵoj /baza materialo/ - kaj grafikaĵoj /afiŝoj, faldfolioj, prospektoj, invitiloj, flugfolioj ktp./ - sen iu ajn antaŭa prilaboro flanke de la kluboj. Bedaŭrinde ni forgesis skribi, ke ni bezonas sole materialon el tri lastaj jaroj /1979-1981/. Tial okazis, ke kelkaj materialoj ne estis ekspoziciitaj - ankaŭ tiuj, kiuj venis malfrue. Malgraŭ tio ni fine de ĉi artikolo dankas al ĉiuj sendintoj de la materialo - ĉiuj meritas dankon, ĉar la ekspozicio abundigis sufiĉe da dokumentoj el nia trijara multflanka agado.

Komence de la jaro 1982 ni definitive rifuzis koncepton de la "foiro de la kluboj". Ni dividis la ekspozicion laŭ tiuj ĉi agadkampoj: strukturo de ĈEA, porpaca laboro, rilatoj de amikeco, literatura kaj eldona agadoj, scienco, turismo, propagando /de la lingvo kaj de la lando/ kaj preso. Samtempe estis lanĉitaj sufiĉe malfacilaj grafikaj laboroj: ĉio estis pentrata kaj skribata en eksterlabora tempo. La laboro postulis precize du monatojn - ĉiutage po 4 - 5 horoj /inkluzive sabatojn/.

La panelojn modele preparis por ni laborulinoj de la propaganda fako de la Kulturdomo Dukla Pardubice. La konstruado kaj aranĝado daŭris ek de la posttagmezo merkrede 17/3 ĝis la posttagmezo vendrede 19/3. /La malmuntado daŭris nur du horojn/. Konstruantoj estis s-anoj Krupka kaj Milev el LG ĈEA Karlovy Vary. Grafikaj laboroj estis preparitaj en propaganda fako de Hoteloj kaj Restoracioj Karlovy Vary - antaŭe sur grandaj kartonoj adaptotaj pliposte sur la panelojn. Por venontaj ekspozicioj mi denove akcentas: kiu deziros ekspozicii, bonvolu sendi n e n i e l a d a p t i t a n materialon: solajn fotografaĵojn kaj taŭgajn grafikaĵojn!

El niaj pentristinoj unuafoje ekspoziciis siajn verkojn s-aninoj Věra Bouchnerová el Nová Paka kaj Ema Rudolfová el Branky; sian agadon konforme kun la agado de ĈEA dokumentis sekvantaj lokaj grupoj kaj sekcioj: Brno /1. Brněnská strojírna/, Frýdek-Místek, Hořice v Podkrkonoší, Hradec Králové, Cheb, Jablonec n/N, Karlovy Vary, Mělník, Opava, Ostrava /VŽKG/, Pardubice-Dukla, Pardubice-Studánka /Interklubo/, Praha, Přerov, Příbram, Teplice, Třebíč, Ústí n/L; Belarta Sekcio, Fervojista Sekcio, Porpaca Sekcio; Ekzamena Komisiono, Metodika-propaganda Komisiono. Al ĉiuj - koran dankon - kaj ĝis la revido post kvin jaroj!

Jaroslav K l e m e n t ,
gvidanto de la komisiono
de ĈEA por preso kaj
propagando

# KRONIKO

Diligenta esperantistino Věra M a r e š o v á , membro de LG en Vsetín mortis la 10-12-1981

LG en Ostrava-Poruba perdis sian diligentan membron. Fine de januaro 1982 forpasis en la aĝo de 82a vivjaro s-ano Jan TARABA, homo por ĉiuj ekzemplodona, esperantisto de sia junaĝo.

Longjara membro de LG en Karlovy Vary s-ano Jan K a z d a forpasis en České Budějovice la 19-an de marto '82.

Honoron al ilia memoro!

Ni funebras


Neatendante forlasis niajn vicojn juna, entuziasma, tute plena da fortoj esperantisto s-ano Vladimír DVOŘÁK el Brodek u Přerova. Junulara movado perdis en li bonan amikon kaj organizanton. Honoro al lia memoro!

STARTO : nepravidelný věstník Českého esperantského svazu, Jilská 10, 110 Praha 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Odpovědným redaktorem Křimský Zdenko. Kresby Pavel Rak, grafická úprava Milan Labašta. Fotografie v textu D. Kočvara a Z. Křimský. Tisk zajišťuje Technické ústředí knihoven Praha. Předáno do tisku 23.4. 1982. Dohledací pošta Praha 07, snížený poplatek za poštovné povoleno ředitelstvím pošt Praha pod č.j. P/1-1267 ze dne 6.4.1979.

STARTO : presorgano de ČEA, Jilská 10, CS-110 00 Praha 1. Aperas 6 foje jare, jarabono 24,-Kčs au 10,50 gld. Jarabonojn akceptas niaj perantoj kaj UEA same kiel pagojn por anoncoj. Respondа redaktoro Z. Křimský, desegnoj P. Rak, grafika arango M. Labašta.





# HALTU POR MOMENTO KAJ PENSU PRI VIA SANO

De tago al tago, de jaro al jaro vi senĉese ion kaptas, ĝis maksimumo streĉante la risorton de via sano. Kiel longe vi volas ankoraŭ toleri tion? Pripensu, ke vi havas nur unu sanon — kaj ebligu al ĝi por tre modera prezo tion, kion ĝi meritas: la kompleksan kuracadon en unu el la plej antikvaj kaj rekonataj banlokoj de Eŭropo.

**ĈEĤOSLOVAKAJ BANLOKOJ**

**— oazoj de sano, trankvilo kaj inspiro —**

KARLOVY VARY - FRANTIŠKOVY LÁZNĚ - MARIÁNSKÉ LÁZNĚ - JÁCHYMOV - TEPLICE V ČECHÁCH
PODĚBRADY - JANSKÉ LÁZNĚ - TŘEBOŇ - JESENÍK
LUHAČOVICE - TEPLICE NAD BEČVOU

**BALNEA** * Reprezentanto de ĉeĥoslovakaj banlokoj kaj kurac-fontoj.
PAŘÍŽSKÁ TŘÍDA 11, 110 01 PRAHA 1, ĈEĤOSLOVAKIO
Tx: 122 215